

Esperanto

Bulgara

ESPERANTISTO



2

1970

ENHAVO

Nikola Aleksiev. Nia organiza laboro — al pli alta ŝtupo	1
C-va. Forĝasis nia veterano Paskal Paskalev	2
* * * Honora verda tabulo	2
Georgi Ĝagarov. Bulgario. Tradukis Tempesto	3
Vätju Rakovski. Lenin. Tradukis Tempesto	3
Vesela Ivanova. Bekri Mujo kaj la sultano	3
* * * Bratan Stojnov Ŝukerov	5
Radka Miteva. „Latva poezio — 1945—1966“	6
Stojan Kostadinov. Al nia junularo	7
* * * Organiza vivo	8
* * * Junulara E-tendaro en Rarpatoj	10
Prof. Dani Vernescu. Letero el Rumanio	10
D. H. Internacia E-Asocio de Juristoj. „Internacia Jura Revuo“	11
Hans Eichhorn. 25 jaroj Popola Respubliko Burgario	12
Olga Cankova. Veliko Târnovo — lulilo de Esperanto en Bulgario	13
* * * La busto de Lenin	15
* * * La plej junaj studentoj	15
Saulceite Neilande. Vintro	16

Sur la kovrilpaĝo:

La vicprezidanto de la Parlamento k-do Georgi Kuliŝev enmanigas la ordenon „Kiril kaj Metodij“ — I grado, ora, per kiu la Prezidentaro de la Parlamento honorigas nian organon „Bulgara Esperantisto“. La ordenon akceptas la ĉefredaktoro de la gazeto k-do Kunĉo Vălev.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio—1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Ing. Cefo Fiko, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Einthoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva, M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**NIA ORGANIZA LABORO — AL PLI ALTA ŜTUPO!**

En la organiza vivo de nia Asocio komenciĝis tre respondeca periodo — la organizaj kunvenoj de la societoj en urboj, vilaĝoj, lernejoj, oficejoj kaj entreprenojoj, kie oni raportos pri la unujara aktiveco kaj pri la novaj laborplanoj. Tio postulas tre seriozan laboron de niaj distriktaj komitatoj, kiuj senpere gvidas la societojn.

La ĝisnuna tre mallonga periodo en la agado de la distriktaj komitatoj montris kiel pozitivajn, tiel ankaŭ negativajn flankojn. Oni povas citi multajn ekzemplojn en la agado de la distriktaj komitatoj en Smoljan, Pleven, Sofio k. a., kiuj estas modeloj por la ceteraj. Ne estas ankaŭ malfacile rimarki la nesufiĉan aktivecon de aliaj distriktaj komitatoj, kiuj aŭ ĝenerale ne komencis ampleksan agadon, aŭ retroiris de konata en la tuta lando bonega agado al dekadenco, almenaŭ al neintensa vivo. Ekzemple, ni ne povas esti kontentaj pri la aktiveco de la distriktaj komitatoj en Plovdiv, Miĥajlovgrad, Burgas k. a.

Pli detale ni analizis la staton de tiuj niaj gvidorganoj en la raporto de la Centra Komitato antaŭ la plenkunsido en novembro p. j. Nun ni deziras nur altiri la atenton de niaj Esperanto-agantoj en la tuta lando pri la neceso tralegi atente la koncernan punkton de la rezolucio de nia plenkunsido kaj bone organizi la elektokampanjon.

Do, la distriktaj komitatoj devas unue doni la necesan organizan helpon al la societaj estraroj, kie estas sentata simila bezono, por bona kaj rezultodona preparo de la elekto-kunvenoj kaj la raportoj pri la aktiveco. Oni devas postuli pagon de la koncerna membrokotizo kaj transsendon de la laŭstatuta procento al la kaso de l'Centra Komitato. Ĉiufanka aktivigo de la societa vivo kaj altiro de novaj membroj estas unuagrada tasko.

La bona prelaboro por la elekto de novaj societaj estraroj garantias la sukceson de ilia agado dum la sekvanta mandato. Nur tio sufiĉas, por substreki la gravecon de la elektokampanjo kaj la respondecon de la meza ĉenero en la organiza sistemo de nia Asocio.

Ni ne forgesu ankaŭ, ke tiu tre grava organiza laboro devas esti religita en la antaŭtagoj de la granda centjara Lenin-Jubileo. Des pli ĝa devas zorgi pri la bonkvalita kaj altnivela organizado de la tuta elektokampanjo en nia Asocio.



*En la kapitalisma tendaro ni diferencigas ankaŭ pli moderan parton . . .
Ĝiaj reprezentantoj pritaksas sufiĉe sobre la aktualan proporcion de la fortoj
en la mondo kaj estas emaj serĉi reciproke akcepteblajn solvojn de la interna-
ciaj disputproblemoj.*

Lenin

FORPASIS NIA VETERANO PASKAL PASKALEV

La 3-an de januaro 1970 en Veliko Târnovo forpasis 90-jara unu el la veteranoj de la bulgara E-Movado — Paskal Paskalev Draganov.



Naskita en 1879, Paskalev frue konatiĝis kun Esperanto. Li havigis al si lernolibron de Ĥristo Popov mem, instruisto en Dolna Orjahovica, kaj el-lernis la lingvon en kurso ĉe Ĥristo Ĥaralambev. Tuj li komencis vastan

HONORA VERDA TABULO

En la abonkampanjo de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ distingiĝis ankoraŭ:

1. Johanes Palu el [Sovetunio, — kolektis 119 abonojn.

2. Boris Drenski el Stanke Dimitrov — 36 abonojn.

3. Atanas Gârgurov el Kjustendil — 25 abonojn.

Dankon al niaj aktivuloj! Sekvu ilian ekzemplon! La varbado de abonantoj ankoraŭ daŭras. Sumojn sendu nur al la kancelario de la Asocio.

Ni nepre atingu 4000!

Ĉu lige kun Lenin-jubileo via societo altiris novajn membrojn kaj plibonigis sian ĉiuflankan agadon?

korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj kaj sindone eklaboris en la loka E-Societo „Lumo“.

Kiam la entuziasmigita esperantistoj en Veliko Târnovo decidis eldoni sian presorganon, Paskalev aktive partoprenis la kolektadon de monrimedoj por tiu ĉi celo. En oktobro 1906 la unua numero de la revuo aperis sub la nomo „Lumo“.

La domo de Paskal Paskalev estis ĉiam malfermita por la amikoj de Esperanto. En ĝi okazis multaj renkontiĝoj de esperantistoj, ĉe kiuj varme parolis pri la Internacia Lingvo kaj recitis proprajn versaĵojn en Esperanto Petr Jordanov, tiam studento de juro, en postaj jaroj elstara bulgara esperantisto kaj ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“.

Dum sia tuta vivo Paskal Paskalev laboris aktive kaj sindone por la progreso de la bulgara Esperanto-Movado. Eterna estu la memoro pri tiu merita Esperanto-veterano!

C-va

BULGARA ESPERANTO-MUZEO

Por pliriĉigi la stokon de fremdlandaj E-gazetoj kaj libroj en la Muzeo, la bulgara samideanoj estas petataj donaci al ĝi apartajn numerojn aŭ tutajn jarkolektojn de bulgaraj E-gazetoj kaj libroj. La Muzeo ilin interŝanĝos.

Adreso: D-ro Boris Nedkov, bul. Dimitr Blagoev 35 (por la Esperanto-Muzeo), Sofio, Bulgario.



BULGARIO

de Georgi Ĝagarov

Malgranda kiom manoplato land'...
Mi tamen ne bezonas vin pli granda.
Feliĉas mi, ke suda estas via sango,
kaj el siliko la malnov-Balkan'.

Ĉu gravas, ke ŝakaloj, lupoj hurlis
en viaj kampoj kaj arbaroj? Ne!
Vi taksis bone tiun, kiu vin
estimis, sed fiulon ne indulgis.

Malgranda kiom manoplato land'...
Sed rompis sin sur via man' fortika
la glaso kun bizanc-venen' mortiga,
kaj sange makulita turka glav'.

De sango kaj tabako komercistoj
pri via etstaturo hontis vin,
sed falis ili kun rompita spin',
ĉar peza, kvankam eta, ja vi estis.

Kaj jen miraklo: morton venkis mort',
kaj ekridetis domoj ĝojoplenaj,
ekflirtis jam standardoj brilsolenaj,
kaj malkovriĝis hela homa sort'.

Vi floras nun! La humo ŝvelas
sub la labora man' de Bulgari',
odoras via korp' je gerani',
kaj novan kanton jam la vent' dispelas.

Malgranda kiom manoplato land'...
Sed vi por mi egalas universon,
ĉar vin mezuras mi do ne per verstoj,
sed per pasia, ebriiga am'!

LENIN

de Vâtju Rakovski

Li estis la aŭroro de l'jarcento.
Li eklumigis nian homan genton,
samkiel eklumigas nin la suno
ĉe la foriro de la noktmallumo.

Li estis la sorĉisto de l'jarcento,
de l'klaso — granda leĝo, la scienco
pri revoluci', poet', pentristo kaj skulptisto,
de l'mondo — kuracist' kaj inventisto.

Epoko estis li por ni, epoko.
Kun li la kant' en ni okupis lokon.
En manoj prenis li la estontecon
ligante firme ĝin kun la grandeco.

La tagoj, jaroj marŝas nehaltante.
Li vivas en ilia mov' konstante.
Li sang' kaj pulso de la klaso restas.
Ĝi estas li, ĝi Lenin estas.

La tradukojn el bulgara faris: *Tempesto*

BEKRI MUJO KAJ LA SULTANO

*Fabelo originale verkita
de Vesela Ivanova*

Tio okazis antaŭ multaj jaroj.
Lumigataj de la sunradioj, la nuboj
veturis en oraj ĉaroj. La tero tremetis
de la plena kiso de la suno. Herboj
kaj floretoj ridetis ĝoje, aŭskultante
la susuron de l'arbaj folioj. Apud framb-
arbusto kuŝis la turko Bekri Mujo.
Li estis ebriega. Apenaŭ li ekstaris sur
la kruoj kaj daŭrigis sian vojon al
Istanbulo.

Iam Bekri Mujo estis tre riĉa homo.
De sia patro li estis heredinta nekal-
kuleblajn riĉaĵojn. La juna Mujo tamen

komencis drinki, kaj baldaŭ de lia here-
daĵo restis nenio. Li ekiris tra la mondo
kiel senhejma vagulo — kun eluzita
kamlotjako sur la dorso kaj truita fezo
sur la kapo.

Kiam Bekri Mujo eniris Istanbulton,
hazarde lin renkontis la sultano. Vi-
dante kiel Mujo balanciĝas ebria sur
la strato, li komencis akre riproĉi lin,
ke li fordrinkis ĉion ricevitan de sia patro
kaj nun vivas, por ke la homoj moku lin.
Sed ebriuloj ne komprenas edifon kaj
Mujo komencis kriegi kontraŭ la sultano.

— Se mi drinkas, mi drinkas per mia mono. Ĉu de vi mi postulas ion ajn? Ĉu vi scias, kiom multe da mono mi havas? Mi povus aĉeti Istanbulon. Diru kiom grandan sumon vi volas?

Kvankam la sultano sciis, ke Mujo ne havas monon, li pensis, ke iu povus pruntedoni al tiu ĉi ebriulo, kaj pro tio li diris:

— La tutan Istanbulon mi ne vendos, sed la duonon mi povus doni por unu buŝelo da ormoneroj.

Mujo ĝojis kaj saltis kiel infano.

— Morgaŭ mi alportos al vi la monon — li kriis. — Sed nur kuraĝu ne plenumi vian promeson . . . Do mi atendas la duonon de Istanbulo.

La sekvan tagon furiozis terura ŝtormo. Kiel nigraj cignoj nuboj aperis sur la ĉielo kaj subite ekfluis torenta pluvo. La sultano atendis Bekri Mujo, sed li ne venis. Komence la sultano supozis, ke la malbona vetero malhelpis lin. Tamen kiam denove ekbrilis la suno, kaj Mujo ne aperis, li sendis homojn, kiuj trovis kaj venigis lin.

— Ordonanto mia, — diris Mujo genuante antaŭ la sultano, — en mia poŝo mi ne havas eĉ groŝon. Ĉu mi povus aĉeti Istanbulon?

Pro tiuj vortoj la sultano tre kole-rigis kaj ordonis, ke oni tuj fortranĉu lian kapon.

Mujo korŝire ploris kaj petis la sultanon indulgi lin, sed nenio helpis. Tiam li diris:

— Bone. La forto estas ĉe vi. Vi pereigos min, sed estu indulgema kaj plenumu almenaŭ mian lastan peton!

— Diru ĝin, — respondis la sultano.

— Ordonu, ke oni trovu tri personojn en via regno: malriĉulon, kiu posedas neniun havaĵon, blindulon, kiu tute ne vidas, kaj kriplulon, kiu ne havas eĉ unu kruron. Oni gastigu kaj trinkigu ilin per vino anstataŭ per ŝerbeto¹, — kaj ni kune ĝuos ilin!

La sultano plenumis la deziron de Mujo. Oni preparis riĉegan manĝotablon

kun plej bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Kiam la tri gastoj satmanĝis kaj plene ebriiĝis, la blindulo diris:

— Dankon al la allaho kaj la sultano, ke ili regalis nin per blanka pano, bakitaj kokidoj kaj ruĝa vino!

— Ho vi, blindulo senokula! — kriegis la kriplulo. — Kiamaniere nevidante vi scias, ke la pano estis blanka kaj la vino — ruĝa? Ĉu vi scias, ke se mi piedfrapos vian aĉan vizagon, mi instruos al vi, kiel oni devas paroli!

— Piedfrapu lin ankaŭ anstataŭ mi! — aŭdigis sin la malriĉulo. — Mi pagos al vi!

La sultano rigardis, aŭskultis mirante kaj ne povis kompreni kiel la kriplulo povas aserti, ke li piedfrapos la blindulon, estante sen kruroj, kaj kiel la malriĉulo povus promesi pagon al li, se li piedfrapus la blindulon anstataŭ li, ne posedante eĉ unu groŝon.

— Jen vidu, via sultana moŝto, kion faras drinkuloj — diris Mujo. — La blindulo ekvidas, la kriplulo ekhavas krurojn kaj la poŝoj de la malriĉulo pleniĝas de mono. En tia stato estis ankaŭ mi hieraŭ, kiam mi volis aĉeti de vi Istanbulon.

Post tiuj vortoj la sultano pardonis al Bekri Mujo. Sed li ne povis kompreni, kiel la vino havas tian forton. Kaj li decidis mem senti ĝin. La sultano ordonis, ke onu alportu plej bongustajn apudmarajn vinojn kaj ebriiĝis tiel, ke la sekvan tagon ne povis levi sian kapon de la kuseno. Li havis fortan kapdoloron. La korteganoj venigis kuracistojn, sed la sultano forigis ilin.

— Nur Bekri Mujo resanigos min! — li diris. — Venigu lin!

Kiam Bekri Mujo venis al la sultano kaj komprenis, kio okazis, li konsilis al li denove drinki de tiu vino, kiun li drinkis la hieraŭan vesperon.

— Sed se ne forpasos mia kapdoloro? — demandis la sultano.

— Drinku plue!

¹ Ŝerbeto — refreŝiga trinkaĵo el siropo.



HEROA PASINTECO

BRATAN STOJNOV ŠUKEROV

Li naskiĝis la 26-an de februaro 1912 en kvartalo Ustovo de urbo Smoljan. Lia patro estis metiisto, sed precipe okupis sin pri brutbredado.

Kiel lernanto en la elementa lernejo Bratan estis „animo“ de la infanludoj. Li defendis la malriĉajn kaj malfortajn infanojn kaj ili tre amis lin. Bratan ne ŝatis mensogojn, ŝteladon kaj maldili-



genton. Dum la somero li kun siaj gefamilianoj laboris sur la tabakkampoj.

En 1926 Bratan estis lernanto en Rajkovo kaj avide studis marksisman-leninisman literaturon. Li fondis komu-

— Kaj ĝis kiam? — rigardis lin mirante la sultano.

— Ĝis la momento, kiam anstataŭ reĝan mantelon vi surmetos ĉifonan jakon kaj anstataŭ turbanon vi surmetos truitan fezon.

La suno staris super la golfo Ora Korno kaj ankaŭ ĝi rigardis mirante.

nismajn studrondojn en la gimnazio kaj abstinulan societon en Ustovo. Kvankam tre juna, li estis elektita de nacia konferenco kiel membro de l'estraro de la abstinulaj societoj en Bulgario. Tiutempe li lernis ankaŭ Esperanton, korespondis kun multaj esperantistoj el diversaj landoj, varbis progresemajn gejunulojn el Ustovo, Rajkovo kaj Smoljan lerni la lingvon en la speciale organizitaj kursoj. Pro lia revolucia agado la faŝistaj regantoj forpelis lin el la gimnazio de Rajkovo kaj li iris en Asenovgrad. Por vivteni sin Bratan dum la gimnaziaj jaroj estis devigita labori en la tabaktenejoj en Plovdiv, Asenovgrad kaj Ustovo. Ĉie li organizis studrondojn kaj strikojn, pro kio kelkfoje estis arestita kaj turmentita de la polico.

Bratan Šukerov finis la gimnazion en 1932 kaj estiĝis instruisto. En 1933 li iris Istanbulon por studi dentkuracadon. Studante li samtempe laboris. La sekvan jaron Bratan studis en Nancy (Francio), sed finstudis en Istanbul. Kiel dentkuracisto li laboris en la vilaĝoj Petkovo, Slavejno, Momĉilovci, Sokolovci k. a., kie li distingiĝis kiel vera popola dentkuracisto-kontraŭfaŝisto.

En 1931 Bratan estiĝis membro de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo) kaj en 1934 — de la Bulgara Komunista Partio. En la periodo 1940—1944 li estis partia sekretario en Smoljan. En 1941 li komencis prepartilaborojn de partizana movado en la regiono de Smoljan, pro kio en 1942 oni lin ekziligis en vilaĝon Babek, regiono de Razlog.

En februaro 1943 oni ĵetis lin en la koncentrejon Krâsto Pole, de kie li revenis Ustovon je la fino de la sama jaro. Denove li komencis organizi kaj helpi per provizado eksterlegajn grupojn. Kaj je la 4-a de majo 1944 li mem iris en la montaron, organizis la partizanan batalionon „Kolju Ŝiŝmanov“ kaj estiĝis ĝia komandanto kun la romo Ognjan. Ĉi tiu bataliono fariĝis timigilo

por la faŝistaj regantoj kaj protektanto por la malriĉa loĝantaro. En julio 1944 en la loko „Ĉil Tepe“ la bataliono renkontiĝis kun la I roto de bataliono „Georgi Benkovski“. La partizanoj al-militis la vilaĝon Manastir, bruligis la impostlibrojn, organizis mitingon. Antaŭ la vilaĝanoj Ognjan arde parolis kontraŭ la faŝistoj. La popolo ĝoje aŭskultis kaj parolis: „Nia doktoro! Nia doktoro!“

La voĉo de l'komandanto estis potenca, li parolis kompreneble, laŭ la loka dialekto, kaj liaj vortoj tuŝis la korojn. Poste la partizanoj kaj la popolo kune tagmanĝis. Tio okazis je la 12-a de julio 1944.

La popolo tre amis Bratan. Ĝi kantis kantojn pri li, rakontis legendojn. Foje Bratan kun kelkaj kamaradoj estis ĉe sia kaŝantino Stajka Dobrinova Mala-

mova en v. Sokolovci. En la apuda ĉambro okazis edziĝfestoj. Subite Bratan aŭdis, ke oni kantas pri li:

Kie estas Bratan por veni,
por veni kaj por ekkanti —
el unu gorĝo du voĉoj —
la edziĝfeston ĝojigi.

La okuloj de Ognjan malsekiĝis pro larmoj, ĝojaj larmoj, ke la popolo lin mencias en siaj kantoj.

Sed la 3-an de septembro 1944 — nur kelkajn tagojn antaŭ la granda tago de la liberiĝo — li estis grave vundita. La libero lin trafis sur hospitala lito. La 23-an de septembro, kiam la tuta popolo gloris la liberon, Bratan mortis. Li tamen restas senmorta en la memoro de l'popolo.

Nun la Esperanto-societo en Ustovo portas lian nomon.

NI RECENZAS

Latva poezio — 1945—1966, eldonejo „Zvaigzne“, Riga, 1968, p. 70, prezo 17 kop. Ĉi tiu libro estas la plej nova poezia antologio, kiu aperis en Esperanto. Ĝi estas eldonita en Litova SSR sub la redaktado de nia samideano Eduards Jaunvalks. La versaĵojn tradukis la poetinoj Elvira Lippe kaj Milda Jaku bcová.

La antologio prezentas al la eksterlandaj gesamideanoj modestan kolekton de poemoj, verkitajn de 22 latvaj aŭtoroj — klasikaj kaj nuntempaj. Tiamaniere ĝi donas al la leganto sufiĉe bonan ĝeneralan imagon pri la evoluo de la poezio en Latvio, pri ĝiaj interesaj, aparte ampleksaj vojoj, pri iuj el ĝiaj jam vaste konataj verkoj.

La konciza, sed profunda analizo de la latva literatura historio, kiun faras Mirdza Burgmeister en la antaŭparolo de l'antologio, ankaŭ helpas nin plene eniri en la mirindan mondon de tiu ĉi enhavoriĉa, muzikplena poezio.

Ambaŭ tradukistinoj havis aparte malfacilan respondecan taskon. Krom la reprezento de multaj aŭtoroj el diversaj epokoj kaj de diversaj literaturaj tendencoj, kun diversaj lingvoesprimado, stilo kaj poezia formo, ili devis traduki el lingvon, kiu tre diferenciĝas de Esperanto ankaŭ laŭ la akcento. En tradukado de poezio tiu ĉi fakto, kiel oni scias, ludas tre gravan rolon. Latva lingvo havas konstantan akcenton sur la unua kaj Esperanto — sur la antaŭlasta silabo. Jen kial, por prezenti

latvan poezion en Esperanto, oni bezonas tradukiston, kiu majstre regas la tradukarton, ambaŭ lingvojn, sed krom tio, kiu ankaŭ mem estas poeto. La nivelo de ĉiuj tradukitaj poemoj, kiel mencias ankaŭ Mirdza Burgmeister, varias sed entute ambaŭ poetinoj bone plenumis sian respondecan taskon. Poemoj kiel „Filino de konstruepoko“ de L. Bridaka, „La plej bela floro de l'ter“ de A. Skalbe, „Siringo de Vrubel“ de I. Ziedonis, „Mickiewicz en ekzilo“ de K. Aizpurs kaj multaj aliaj en la perfektaj tradukoj de E. Lippe, kaj ankaŭ tiuj kiel „Sur aeraj vojoj“ de O. Gutmanis, „Gravitacio“ de A. Elksne kaj „Poeto“ de K. Aizpurs, esperante prezentitaj de M. Jakubcová, estas vera sukceso ne nur pri la talentaj samideaninoj, sed pri la tuta esperanta tradukliteraturo. Ĉi tiu prijuĝo eble plej forte validas pri iliaj tradukoj el la poezio de Konstantins Aizpurs, kiun ni, bedaŭrinde, ne konis ĝis nun. En sia poemaro „Mickiewicz en ekzilo“ kaj en la soneto-akrostiko „Poeto“, dediĉita al Adam Mickiewicz, li majstre uzas viglan dialogon, kvintojn, soneton kaj akrostikon, por montri al ni poezie kelkajn vivepizodojn de la genia pola poeto kaj patrioto. La tradukistinoj bonege sukcesis konservi ĉi tiujn poeziajn rimedojn. Tiamaniere ili ankoraŭfoje montras sian talenton arte traduki kaj doni plenan imagon pri la karakterizaj trajtoj de ĉiu poezia verko, de ĉiu aŭtoro.

Radka Mitova





AL NIA JUNULARO

Mi vidas vin ĉiutage. Mi vidas vin ĉie. Ni kune vivas, kune sopiras pri paco kaj interkompreniĝo sur la tero. Ni laboras kaj batalas por tio ankaŭ per la Internacia Lingvo Esperanto. Vi estas ĉiam en la antaŭaj vicoj. Vi — nia entuziasma, firma kaj sindonema Esperanto-junularo.

Per vi komenciĝas niaj kunvenoj, per vi komenciĝas niaj manifestacioj, lernojaroj, ekskursoj. Per vi kaj nur kun vi komenciĝas, efektiviĝas kaj finiĝas la junularaj festivaloj. Vi estos la koro kaj la animo ankaŭ de nia Dekaj Jubilea Festivalo en Veliko Târnovo honore al la 25-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario kaj la 100-jara naskiĝtago de l'granda Lenin.

Juneco, forto, vikleco, beleco, eleganteco, scio kaj kapablo — jen kio stimulis vin organizi la unuan junularan Esperanto-festivalon. Pli ol dek aroj pasis de tiu momento — kaj via iniciato jam fariĝis forta kaj amata tradicio. Dum ĉi tuta tempo vi partoprenis konstante kaj frunte la batalon por paco kaj amikeco inter la popoloj, por paca kunekzistado kaj interkompreniĝo.

Neniam la malamikoj de la paca kunekzistado ĉesis pensi pri novaj kaj novaj konfliktoj inter ŝtatoj kaj popoloj. Kaj se en tiu malpaca kaj tumulto epoko estis sobraj voĉoj por paco kaj paca kunekzistado, vi, esperantista junularo, kun viaj kantoj, versoj, studoj, dancoj, kun ĉiu alia manifestiĝo estis kaj estas pasiaj kaj sinceraj defendantoj de la paco kaj amikeco inter la popoloj!

Kantu kaj dancu, studu kaj laboru vi, koramata Esperanto-junularo, liberigita por eterne el ekspluatado de homo fare de homo! Kantu pri nia traktoro, kiu forsendis la lignan plugilon en la muzeon! Kantu pri nia patrujo, kies tero nun donas trioble pli ol dum la tempo de la vilaĝaj privatuloj! Kantu pri la bulgara genio, traborinta vian teran bruston, por ke ŝprucu el ĝi nefto! Kantu pri nia metalurgio kaj maŝinkonstruado — novaj kaj nekunataj branĉoj en Bulgario antaŭ dudek jaroj! Kantu pri la frata subteno de USSR, sen kies helpo ni ne povus esti industria kaj floranta socialisma lando! Kantu pri nia saĝa gvidanto — Bulgara Komunista Partio, sub kies gvido vi kreas kaj amuziĝas, studas kaj laboras!

Kantu kaj dancu, kara Esperanto-junularo! Kaj memoru: por nia libero, por via libero, por ke vi vivu en feliĉo, por ke vi libere kantu kaj ludu, studu kaj laboru, pereis tiaj admirindaj esperantistoj-junuloj, kiel Vela Peeva, d-ro Vârban Genčev, Dimitr Kaljaŝki, Angel Ĉopev, Hristo Kârpačev, Dičo Petrov, Penka Miĥajlova, Todor Sofroniev, Nikola Miŝev kaj amaso da aliaj.

Kantu kaj dancu, studu kaj laboru vi, libera Esperanto-junularo! Kantu pri socialismo, pri komunismo!

Stojan Kostadinov

Fine de 1969 geedziĝis inĝ. Blagovesta Haĝinikiforova el Gabrovo kaj inĝ. Nikola Uzunov el Haskovo — ambaŭ bonaj kaj aktivaj esperantistoj. Al la nova geedza paro ni bondeziras sukcesojn, sanon kaj feliĉan vivon!

ORGANIZA VIVO

CELEBROJ DE ZAMENHOF

Levski. Solene celebris la 110-an naskiĝtagon de Zamenhof la esperantistoj de E-Societo „Trumpetisto“ — Levski. K-ino Penka Porolieva parolis pri la vivo kaj afero de nia Majstro. Sekvis riĉa belarta programo, kiun partoprenis Iv. Jordanov, d-ro Belĉev, Porolieva, Angelov, Nejkov, Poroliev kaj lernantoj el la elementa E-kurso ĉe lernejo „Krum Pov“.

Iv. Jordanov

Kjustendil. En solena kunveno okaze de la 110-a naskiĝtago de Zamenhof raporton pri lia vivo kaj agado faris k-do Atanas Gărgurov. Sekvis gaja, amika kunesto, amuzado kaj dancoj.

A t. G.

Veliko Târnovo. Antaŭ Zamenhof-kunveno prelegis k-ino Olga Cankova. K-doĵ Dolĉinkov kaj Najdenov rakontis memoraĵojn. Cankova ankaŭ rakontis impresojn pri la 54-a UK en Helsinki. La kunveno finiĝis per amika amuzado kaj dancoj.

Esperantina

Dimitrovgrad. Okaze de la Zamenhof-naskiĝtago en kunvenoj kaj E-kursoj oni parolis pri la vivo kaj agado de nia Majstro, plenumis artprogramojn, prezentis florkronojn antaŭ lian buston.

Teksto kaj foto: J. Zaprianov



ESPERANTO—AGADO EN LA VESTAJTEKNIKUMO EN VRACA

Jam kelkajn jarojn en la vestajtechnikumo en Vraca la Internacia Lingvo estas instruata de la instruisto Georgi Marinov. Dum la pasinta lernoĵaro ĉi tie funkciis du Esperanto-klasoj kun entute 82 lernantinoj. En la teknikumo oni aplikas multflanke la lingvon: korespondas kun multaj landoj, akceptas alilandajn gastojn, aranĝas ekskursojn eksterlanden, vizitas grupe la festivalojn de BEJ kaj la kongresojn de la bulgaraj esperantistoj, prizorgas konstantan vitrinon kun esperantaĵoj ktp. Ĝis nun grupoj de lernantinoj vizitis Hungaron, Ĉeĥoslovakion, Rumanion, Sovetunion, Jugoslavion.

La someron de 1969, partopreninte la internacian renkontiĝon de naturamikoj en Abaliget (Hungario), nia grupo vizitis ankaŭ la bulgaran milittombejon en Harkani, kie per unuminta silento ĝi esprimis estimon al la pereintaj en Hungario bulgaraj militantoj kontraŭ la germana faŝismo. Antaŭ la tombejo la grupo prezentis konvenan patriotisman programon.

Neforgeseblaj restos la sentoj de amikeco, kiuj plenigis la korojn de la junaj esperantistinoj dum la gastado de grupo da esperantistoj el Pecz (Hungario), kiu vizitis urbon Vraca. Dediĉe al ili oni organizis grandan solenan vesperon en salono de „Balkanturist“, en kiu la gastojn salutis la sekretario de l'Urba Komitato de BKP k-do Ganĉo Marinov. Parolis ankaŭ la konata E-veterano en Vraca Radoslav Triĉkov. Respondis kortuŝe la gvidantino de la hungara grupo k-ino Kovacz.

En Vraca kaj al la esperantistoj el la vestajtechnikumo gastis en la aŭtuno de 1969 ankaŭ k-ino Viki Kemrova el Pilzen (ĈSSR), kiu esprimis admiron pro la grandaj sukcesoj de la bulgara Esperanto-Movado kaj la beleco de nia patrolando.

Fine de novembro 1969 la E-Societo en la vestajtechnikumo havis sian jarkunvenon, kiun ĉeestis la prezidanto de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto k-do Ĥristo Panĉev — membro de CK de BEA kaj prezidanto de la Instruista E-Societo en Vraca „D-ro L. L. Zamenhof“, k-do Dimitr Sertov — prezidanto de CK de BEA, k-do Enjo Daskalov — membro de CK de BEA kaj gvidanto de Lernanta E-Societo „Anne Frank“, k-do Bojĉo Mladenov — membro de la DK de BEA kaj gvidanto de Lernanta E-Societo „Verda Raketo“, k-do Paŝtrapanski — prezidanto de E-Societo „Sukceso“ en Vraca k. a. La junaj esperantistoj starigis antaŭ si novajn taskojn por disvastigo kaj apliko de Esperanto: pligrandigi la membraron, plialtigi la lingvan nivelon, organizi vastan korespondadon kun eksterlando k. a.

Lernantino



ESPERANTO-MANIFESTIĜO EN LA POLA KULTURA CENTRO

La 19-an de januaro k. j. okazis la ĉiumonata kunveno de la esperantistoj el Sofio en la Pola Informa kaj Kultura Centro.

Kolektiĝis ĉirkaŭ 100 personoj. La direktoro de la Centro, k-do Kornel Henschke, parolis pri la ĉefurbo de frata Pollando Varsovio okaze de la 25-a datreveno de ties liberigo el faŝista jugo.

Poste k-do Simeon Ĥesapĉiev, kiu kelkfoje vizitis Varsovion, promenigis la ĉeestantojn tra la stratoj kaj parkoj de la pola ĉefurbo.

La kunveno finiĝis per spektado de la pola filmo „Nevenkita urbo“.

En la biblioteko de la Pola Centro oni povas legi polajn Esperanto-librojn kaj revuojn.

Roko

Denaska esperantistino

Kameliĵa Enĉeva Daskalova, naskita la 6-an de junio 1967, estas verŝajne la plej malgranda denaska esperantistino en nia lando. Ido de gepatroj-esperantistoj, ŝi komencis paroli la Internacian Lingvon denaske. Ŝi havas nun geamikojn-infanojn en 10 landoj.

EL LA KOMERCISTA PRAKTIKO

Esperanto ankoraŭ ne estas vaste enkondukitita en la mondan komercan kaj industrian vivon. Kaj tamen unuopaj firmoj kaj komercistoj ofte trovas ĝin tre utila kaj profitiga en malgranda skalo. Jen du lastaj ekzemploj.

Husen Al-Amili lernis Esperanton antaŭ nur kelkaj jaroj. Hodiaŭ li estas delegito de UEA por Bagdado kaj fak-delegito por internacia komerco. Ĉi-jare, en septembro-oktobro, li faris komercan vojaĝon tra Eŭropo, utiligante siajn Esperanto-kontaktojn en ŝep landoj.

Husen Al-Amili vizitis ankaŭ Bulgarion — la Internacian Foiŝon en Plovdiv, kaj subskribis kontraktojn kun bulgaraj eksportfirmoj por aĉeto de feraĵoj. En Sofio s-ano Al-Amili detale diskutis kun la sofiaj esperantistoj organizajn kaj propagandajn Esperanto-problemojn.

Alia fak-delegito, juvelisto Jack Snarberg el Stokholmo, antaŭ nelonge entreprenis komercan flug-vojaĝon al Hindujo, Honkongo kaj Japanujo. Ne nur li ĉie uzis la delegitan reton de UEA por siaj komercaj kontaktoj, sed li uzis ekskluzive nur Esperanton en ĉiuj inrertraktoj.

E-kurso en Jasenovac

La 14-an de januaro 1970 en v. Jasenovac, distrikto de Razgrad, estis malfermita kaj komencis funkcii kurso de Esperanto por komencantoj. La kurson gvidas Marin Deskov dufoje en la semajno. Ĝin partoprenas precipe ĝeinstruistoj, agronomoj, oficistoj el la labor-kooperativo kaj vilaĝa soveto, elektroteknikistoj k. a. La kurson partoprenas ankaŭ la ĉefa agronomo de la agrikultura laborkooperativo „Kremlo“ — Radko Ivanov, la direktorino de la loka fundamenta lernejo Milka Radanova, la partia sekretario Mehmed Ĉauŝev k. a.

La intereso de la kursanoj al la instruita materialo estas laŭdinda. Baldaŭ fondiĝos ankoraŭ unu Esperanto-societo en nia lando.

Nun ni pritaksas la problemon pri baldaŭa ekfunkciado de E-kurso por ĝelernantoj de la okaj klasoj.

Pioniro

Esperantistoj el Kjustendil post la celebrado de d-ro Zamenhof. La starantoj nun lernas la lingvon.



TRA LA E★ MONDO

JUNULARA E-TENDARO EN KARPATOJ

En aŭgusto de 1969 pli ol 170 junaj esperantistoj el 43 urboj de Sovetunio alvenis al la pitoreska monta urbeto Slavsko en Karpatoj por partopreni la studentan-junularan E-tendaron, kiun ĉi-foje organizis la esperantistoj-aktivuloj de Ukrainio. (En 1968 simila junulara tendaro okazis en Altaĵo).

Al la solena malfermo de la tendaro estis invititaj ankaŭ gastoj el la Regiona Komitato de Komsomolo, el la redakcio de Skole, el la loka estraro.

En la nomo de la preparokomitato ĉiujn partoprenantojn en la tendaro salutis ĝia organizantino Maria Vaŝĉiŝina — gvidantino de la E-klubo „Amikeco“ en Strij. Ŝi esprimis la konvinkon, ke la Internacia Lingvo de la paco kaj amikeco inter la popoloj — Esperanto — ankaŭ plue prosperos en la Soveta lando. La parolantino substrekis, ke ĉi tiun E-konferencon oni aranĝis dediĉe al la glora datreveno — la 100-jara jubileo de la naskiĝo de Vladimir Iliĉ Lenin.

Poste varme salutis la ĉeestintojn V. Ŝilas — gvidanto de la E-klubo en Vilnius, B. Kolker el Ufa (Baŝkirio), M. Bernŝtejn el Tula k. a. La gastoj donacis al la mastroj, organizantoj de la tendaro, originalajn memordonacojn.

En la kadro de la tendaro sukcese funkciis Somera Universitato, kie oni aŭskultis la jenajn prelegojn: „V. I. Lenin kaj Esperanto“, „Tekniko de tradukado“, „La kreado de la famaj E-poetoj J. Baghy kaj N. Hoŝlov“ k. a. Funkciis ankaŭ seminario por junaj gvidantoj de la E-Movado, kie oni interŝanĝis sperton.

Oni aranĝis interesan ekskurson al la urbo Mukaĉevo en Transkarpatio.

Ĉiuvespere okazis amatoraj artkoncertoj de ukrainoj, litovoj, mezazianoj, siberianoj k. a. — nur en Esperanto! Aktivis ankaŭ tre gaja kaj sprita „Klubo de gajaj kaj eltrove-maj“. Por komencantoj kaj progresintoj funkciis E-kursoj.

Krom tio estis organizitaj diversaj konkursoj: literatura, sporta, pri E-kantoj k. a.

La partoprenantoj en la tendaro helpis al la loka sovetunio sarki la betojn.

La tendaranoj aktive partoprenis la solenan kunvenon, dediĉitan al la 25-a datreveno de la liberigo de Slavsko el la faŝista okupado. En la prezidantaron de la kunveno oni elektis ankaŭ la E-veteraninon el Lvov I. S. Voloŝĉak, kiu varme salutis la ĉeestantojn. Salutojn prezentis ankaŭ esperantistoj el aliaj respublikoj: Algis Vizhirdas el Klajpeda (Litovio), studentino-uzbekino Tamara Madalinova, moskva ĵurnalisto A. Ĥarkovskij k. a.

En la Domo de la Kulturo okazis vespero por la loka loĝantaro. La instruistino M. Vaŝĉiŝina, la moskva docento B. Tokarev kaj la litova esperantisto V. Ŝilas interese rakontis pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj pri la E-Movado en la mondo, respondis al multnombraj demandoj. La vespero finiĝis per amatora artkoncerto en Esperanto.

La loka estraro kaj la regiona komitato de Komsomolo favore rilatis al la junaj esperantistoj kaj ĉiamaniere helpis ilian gravan kaj utilan laboron.

Ĝenerale la junulara duŝemajna E-tendaro en Karpatoj pasis interese, fruktodone kaj sukcese.

* * *

Ukrainaj esperantistoj aktive partoprenis ankaŭ en aliaj E-aranĝoj:

1. En leningradaj renkontiĝoj kun la eksterlandaj gesamideanoj, revenintaj el la 54 Universala E-Kongreso en Helsinkio;

2. En la solena vespero de internacia amikeco, kiu okazis en la Domo de paco kaj amikeco en Leningrado;

3. En la XI Balta Esperanto-Tendaro en Viljandi (Estonio), kie dum la Somera Universitato oni aŭskultis interalie ankaŭ la prelegon „V. I. Lenin kaj la ukraina literaturo“ de Nadja Andrianova.

El „Tra Soveta Ukrainio“ № 5/1969

Letero el Rumanio

Ĉar bonaj novaĵoj el Esperantujo interesas vin, mi volas sciigi al vi, ke ni jam havas novajn eblecojn por disvolvi nian esperantistan agadon. La Ŝtata Komitato por Arto kaj Kulturo donis al ni aprobon fondi E-grupojn en la kadroj de la kulturaj domoj. Profitante la novajn eblecojn, ni havas nun esperantistan grupon en la bukureŝta kulturdomo, kiu jam ekagadis.

Tiel, la 14-an de decembro ni celebris la 110-an datrevenon de l'naskiĝo de d-ro Zamenhof, kreinto de la Internacia Lingvo. Mi



havis la honoron fari la festparoladon en rumana lingvo, ĉar ĉeestis ankaŭ multe da neesperantistoj. Post la parolado okazis interesa artprogramo.

Nian solenaĵon ĉeestis ankaŭ grupo de bulgaraj esperantistoj el Ruse kaj Blagoevgrad. Sano Markov el Blagoevgrad, prezidanto de la tiea esperantistaro, salutis la ĉeestantojn en la nomo de la bulgaraj esperantistoj. Regis vere gaja atmosfero kaj amikeco.

Mi deziras al la bulgara esperantistaro novajn sukcesojn en ĝia poresperanta, t. e. porpaca agado!

Prof. Dani Vernescu

INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ (IEAJ)

La Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) estas aliĝinta faka organizaĵo de UEA, fondita en 1957 dum la 42 Universala Kongreso de Esperanto en Marsejlo (Francio).

La celoj de IEAJ estas:

a) disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj kaj antaŭenigi ĝian praktikan uzadon en la internaciaj rilatoj de juristoj;

b) helpi la utiligon de la Internacia Lingvo por fakaj, profesiaj celoj de la membroj.

IEAJ havas tri kategoriojn de membroj: ordinara, eksterordinara kaj subtenanta. Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu diplomiĝis ĉe jura fakultato aŭ samranga alta lernejo kaj kiu parolas la Internacian Lingvon. Kiel eksterordinara membro povas esti akceptita ĉiu esperantisto, kiu estas studento de juro aŭ kiu laboras en juĝejo, tribunalo, advokata aŭ notaria kancelario, aŭ en simila jura institucio. Kiel subtenanta membro povas esti akceptita ĉiu fizika aŭ jura persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi la Asocion. Je la dato de la 54-a UEK la Asocio havis 174 membrojn en 31 landoj inkluzive nian landon. La membrokotizo¹, kiu inkluzivas la abonon por la Internacia Jura Revuo, estas jare 2 usonaj dolaroj aŭ ties egalvaloro.

La Asocio estas gvidata de kvinmembra plenumkomitato, elektita por trijara periodo. Ĝia nuna prezidanto estas prof. d-ro Ivo Lapenna, la prezidanto de UEA.

¹ Aliĝdeklaroj kaj membrokotizoj por IEAJ kaj abonkotizoj por Internacia Jura Revuo estas sendendaj al la sekretarioj-kasistoj de IEAJ je la subaj adresoj:

a) D-ro Ludwig Röhl, D-887, Günzburg, Dillingenstr. 7, GFR.

Sumojn sendu al: Postscheckamt München № 1246 66 (d-ro Ludwig Röhl), GFR.

b) D-ro Lajos Márton, prokuroro, Hajnóczy utca 2, Budapest XII, Hungario.

IEAJ havas siajn jarkunvenojn en la kadroj de la universalaj kongresoj de UEA. En tiuj kunvenoj estas farataj prelegoj je anticipe difinitaj komparjuraj temoj. Ĝis nun estis pritraktitaj la jenaj temoj: la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj (1958), la pozicio de la advokato en diversaj landoj (1960), la respondecado de la aŭtospendantoj (1961), evoluoj en la Soveta Juro en la periodo 1958—1962 (1962), la koncepto de proprieto kaj ĝiaj ĉefaj limigoj en diversaj landoj (1964), la principo de la egalrajteco de seksoj en la familia juro de diversaj landoj (1966), la ŝtataneco laŭ la juro de diversaj landoj (1967), la rajto de kunveno kaj organiziĝo laŭ la juro de diversaj landoj (1968), la rajto havi domon laŭ la juro de diversaj landoj (1969).

INTERNACIA JURA REVUO

Jam kvaran jaron aperadas la trimonata faka Esperanto-revuo „Internacia Jura Revuo“, organo de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ).²

La revuo aperas en Budapeŝto. Ĝia ĉefredaktoro estas d-ro Lajos Márton, prokuroro. La abonkotizo por membroj de IEAJ estas 1 usona dolaro aŭ ties egalvaloro jare.

La revuo pritraktas diversajn temojn el la jura scienco kaj praktiko. Ĝi konatigas siajn legantojn pri problemoj de internacia juro kiel la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la internacia reĝimo de Antarkto k. a., pri la juraj sistemoj de diversaj landoj kaj la solvo de diversaj juraj problemoj en unuopaj ŝtatoj kiel ekz. la ŝtataneco, la pozicio de la advokato, la rajto de la inventinto, la rajto de kunveno kaj organiziĝo k. a. Pro tio ĝi havas certgrade karakteron de internacia revuo de kompara juro. Bedaŭrinde ĝis nun neniu artikolo aperis pri la juro de la Popola Respubliko Bulgario. La manko de tiaj artikoloj en la revuo ŝuldiĝas nur al la pasiveco de la bulgaraj esperantistoj-juristoj, malgraŭ ke multaj niaj samlandanoj estas membroj de IEAJ.

Kvankam la revuo estas destinita servi profesiojn, ĝi estas interesa ankaŭ por nefakuloj, ĉar la artikoloj, publikigitaj en ĝi, pritraktas problemojn, kiuj ofte tuŝas la ĉiutagan vivon.

Krom la utilo, kiun alportas al siaj legantoj, la revuo kontribuas ankaŭ al la evoluigo de la Internacia Lingvo en unu tre grava kampo de ĝia apliko, kia estas la juro, per kreado de faka literaturo kaj ellaborado kaj precizigo de jura terminaro. Precipe grava estas la ellaborado de la jura terminaro en Esperanto, kiu

² Materialojn por la IJR sendu al la ĉefredaktoro je la adreso: D-ro Lajos Márton, Budapest 502, Pf. 13, Hungario.

povas esti realigita nur per la komunaj penoj de la esperantistoj juristoj el tuta mondo. Tiamaniere la revuo kontribuos al la preparado de Esperanto por plenumi sukcese sian taskon en la internaciaj rilatoj (diplomatia, internacia komerco, internaciaj kontraktoj), kie la juro ludas gravan rolon.

Koncerne la terminaron tamen oni devas konstati mankon de unueco ĉe uzado de pluraj terminoj fare de diversaj aŭtoroj kaj la uzadon de netrafaj esperantaj esprimoj sub la influo de la gepatra lingvo. Oni povas montri multajn ekzemplojn tiurilate, sed tio ne estas la celo de tiu ĉi artikolo.

La revuo nun havas financajn malfacilaĵojn

La alaj pri ni

25 JAROJ POPOLA RESPUBLIKO BULGARIO

La Balkana Duoninsulo ankoraŭ por niaj gepatroj estis sovaĝa necivilizita parto de la terglobo. Ĝi nomiĝis „malantaŭa korto de Eŭropo“. Neimageble, ke la situacio jam post nur 25 jaroj estas esence alia.

La 9-a de semtembro 1944 estas por la bulgara popolo kulmino de ĝia jarcenta liberiga batalo. La Ruĝa Armeo alportis al Bulgario ne nur la liberigon de faŝismo propra kaj hitlera. Ĝi ankaŭ venkis la nacian dependecon, la jugon de la internacia financa kapitalo.

En tiu ĉi jaro la Popola Respubliko Bulgario festas la 25-an jubileon de tiu tago. Inda okazo por retrospektive taksi ĉi etapon. Mi ne kompetentas juĝi pri tutŝtataj, ekonomiaj kaj politikaj aferoj. Du okuloj de simpla homo tute ne sufiĉas por rigardi kaj mense kapti aspektojn de 25-jara ŝtata evoluo. Des pli, ĉar ĝi signifas la komenco de la socialisma sistemo. Tiu nova socia sistemo estas la plej kuraĝa kaj samtempe plej necesa nuntempa entrepreno homara. Nur al niaj posteuloj eblas plene kompreni tiujn nunajn jarojn.

Sed — mi vivis en Bulgario. Mi tre proksimis al la animo de Bulgario. Mi almenaŭ parte kaptis la eksplodajn ŝanĝojn en la lando. Kaj ĉefe mi komprenas la bulgarojn. Ne nur laŭ teknike lingva vidpunkto, sed ankaŭ per mia sento. La kong de Bulgario laŭ prospektoj de iu vojaĝoficejo estas tro supraĵa. Bulgario estas pli ol natura paradizo, konsistanta el rozoj, fruktoj, montaroj kaj maro. Ĝi estas lando, pulsanta pro vivoĝojo kaj konstruemo, lernemo kaj kreiveco. Mi vivis du jarojn inter Vitoŝa kaj Nigra Maro, mi spertis multon kaj ankoraŭ ne ĉion. Tamen mi scias, kion signifas 25-a jubileo de liberigo.

Ĉu la fakto mem, ke gejunuloj el GDR venas Bulgariion por studi sciencojn, ne pravas la historian eventon? La popolo, kiu dum jar-

pro la malgranda nombro de la abonantoj, kiuj povas esti venkitaj per varbado de novaj abonantoj.

La Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la Internacian Juran Revuon kaj deziras al ĝi plurajn sukcesojn. Ĝi alvokas la bulgariajn esperantistojn-juristojn subteni la revuon per abonkotizoj kaj per artikoloj pri problemoj el nia socialisma juro, kiu nun estas en procedo de renoviĝo kaj perfektigo.

La plej grava formo de agado de IEAJ estas la eldonado de ĝia organo „Internacia Jura Revuo“, fondita en 1966, kiu aperas en Budapeŝto.

D. H.

centoj suferis sub la turka jugo, kiu poste nur farse ekzistis sur la landkarto, nun kapablas peri plej modernajn sciencajn akiraĵojn.

La helpemo de docentoj kaj profesoroj, de kunstudintoj bulgaraj kaj de ĉiu ajn bulgaro estis neimagebla. Per tio ni fakte forgesis, ke ni troviĝis eksterlande.

Ĉiuj bulgaroj bone sciis, ke ni venas el nova Germanio. Ofte oni demandis „Ĉu vi venas el *nia* Germanio?“, komprenigante per tio, ke estas pli ol afabla la helpemo al eksterlandano. Oni helpis nin kiel fratoj. Eĉ en malgrandaj vilaĝoj cedis iom la distanco pro nia germaneco, kiam klariĝis, ke ni nenion komunan havas kun tiuj germanoj, kiuj antaŭ 30 jaroj venis Bulgariion. Ili komprenis, ke ni estas samcelanoj. Ni ĉie sentis, ke niajn du ŝtatojn ligas vere nevenkebla komuneco: la komuna estonto.

Ĉiupaŝe ni vidis la signojn de la nova epoko socialisma: novaj vilaĝoj kaj urbetoj, ne troviĝantaj en iu ajn geografia karto, akvobariloj kaj novaj uzinoj, vilaĝaj klubejoj kaj universitatoj, turistaj ripozejoj kaj plenaj magazenoj, ridantaj homoj kaj petolaj infanoj.

Ĉiupaŝe ni sentis la estimon kaj admiron de la bulgaroj pri sia revolucia pasinteco, pri siaj herooj kaj sciencistoj, sed pli ni vidis la fieron pri la floranta kaj prosperanta estonto. Bulgario, tio estas bastiono de nia socialisma afero. Nuntempa Bulgario — tio estas la spirito de *Dimitrov, Levski, Botev kaj Blagoev*. Bulgario — jen nia intima amiko sur la Balkana Duoninsulo. Dum nur 25 jaroj — tempo, kiu laŭ historiaj mezuroj neniom kalkulas, ĝi el primokita malantaŭkorta estaĵo iĝis fortikaĵo de la socialismo kaj la paco.

Gratulon kaj milojn da bondeziroj por niaj bulgaraj geamikoj, por Bulgara Esperanto-Asocio, por la tuta bulgara popolo!

Hans Eichhorn,


„Der esperantist“ № 34-35/1969 (mallongigita)



KOSSUTH-MUZEO EN ŜUMEN

La liberec-batalo de la hungara popolo en 1849 estis venkita de la Habsburgoj. La venĝo estis kruelega: la gvidantoj de la revolucio estis senescepte ekzekutitaj. La ĉefrolanto de la revolucio Lajos Kossuth (Lajoŝ Koŝut) eskapis el la lando ĉe Vidin al bulgara (tiampe turka) teritorio. Li kaj ĉirkaŭ 2000 elmigrantoj estis loĝigitaj en novembro 1849 en la bulgara urbo Ŝumen. La kolonio de la hungaroj poste vigle partoprenis en la bulgara socia vivo kaj multilate utile influis la ekonomian kaj kulturen nivelon. Inter aliaj, la elmigrintoj fondis la unuan bulgaran orkestron, ili mem organizis la unuan bulgaran teatron, fondis la unuan bulgaran bierfabrikon kaj aliajn industriojn.

Kossuth loĝis en la domo de la riĉa bulgaro Dimitraki Pandov. El tiu domo la bulgara ŝtato



faris en 1949 muzeon, en kiu troviĝas kelkaj montrotabuloj kaj vitrinoj kun tre lerte kaj precize kolektitaj memoraĵoj. La ceteraj ĉambroj estas meblitaj laŭeble laŭ originala formo.

„Hungara vivo“ № 2/1969

VELIKO TÂRNOVO — LULILO DE ESPERANTO EN BULGARIO

Veliko Târnovo — unu el la plej belaj urboj en la mondo, altiras multajn turistojn kaj vizitantojn pro sia unika situo. Ĝia pasinteco estas glora kaj heroea. La ĉefurbo de la Dua Bulgara Ŝtato (1186—1396), nomita „Carino de la Urboj“, „dua Konstantinopolo“, „tria Romo“, daŭrigis sian intensan vivon dum la bulgara Renesanco. Ĝi estiĝis unu el la centroj de nia nacilibera batalo kaj lulilo de la socialismo en Bulgario.

Târnovanoj estis ĉiam sciemaj kaj kulturaj homoj. Per la urba legejo „Nadejda“ („Espero“) ili estis informataj pri ĉiuj eventoj kaj eltrovaĵoj. Post kiam Schleyer (Ŝlajer) aperigis sian Volapükon, la târnova instruisto Miĥail Seizov tuj verkis favoran artikolon pri ĝi. Baldaŭ en la urbo formiĝis grupo de volapükistoj, inter kiuj ankaŭ mitropolitino Kliment (la fama verkisto Vasil Drumev, aŭtoro de la novelo „Malfeliĉa familio“ kaj la historia dramo „Ivanko“) kaj la konata apotekisto Nikola Zlatev. Tamen post la apero de la Zamenhofa Esperanto ĉiuj volapükistoj, escepte M. Seizov, forlasis Volapükon. Laŭ la iniciato de N. Zlatev en 1891 en nia urbo estis fondita Esperanto-Societo „Flamo“. Ĝi vivis nur kelke da tempo, ĉar en 1893 okazis la konata politika proceso kontraŭ mitropolitino Kliment: la 14-an de januaro 1893, la naskiĝtagon de la tiam bulgara princo Ferdinand, mitropolitino Kliment anstataŭ eldiri laŭdajn vortojn faris paroladon kontraŭ li.

Grandan rolon en nia E-Movado havis la progresema instruisto el Dolna Orjaĥovica Hristo Popov, kiu en 1895 tradukis la rusling-

van lernolibron de d-ro Zamenhof. Post unu jaro, la 1-an de majo, oni restarigis kaj rebaptis la E-societon en Târnovo. Ĝia nomo fariĝis „Lumo“. Ĝia statuto estis aprobita de la Ministerio de Internaj Aferoj. Neniujn informojn pri la unuaj paŝoj de la Societo ni havas. Ĝia vigla agado komenciĝis post la reveno de nia samurbano Hristo Haralambev el Peterburgo. En Ruslando, tiutempe centro de la E-Movado, Haralambev ellernis Esperanton kaj konatiĝis kun la agado de la rusaj esperantistoj. Reveninte Târnovo'n li fariĝis vigla propagandanto de Esperanto en la urbo. Tre energia homo, li kolektis ĉiujn agemajn gesamideanojn, kiuj formis la kernon de nia E-Societo, nome: liaj du fratoj Nikola kaj Georgi, Ilija Zlatev, Ivan Nenkov, Paskal Paskalev. Haralambev gvidis kursojn laŭ la metodo de Cart kaj Hr. Popov, amase vizititajn. Ĉiuj E-aranĝoj: amuzvesperoj, kunvenoj, promenadoj k. a., sub la nomo „Barĉo“, akcelis la propagandon de Esperanto kaj ties ideojn.

Esperanton en nia urbo propagandis ankaŭ Hristo Popov. En 1900, 1902, 1907 en la urba legejo „Espero“ li faris prelegojn pri la utilo de Esperanto.

En 1904 la membroj de „Lumo“ atingis 70—oficistoj, instruistoj, metiistoj, lernantoj. Ilija Zlatev, apotekisto kaj aŭtoritatulo, filo de N. Zlatev, kiel prezidanto de „Lumo“ stabiligis finance la Societon. Hotelo „Royal“ malfermis gastame siajn pordojn marde kaj vendrede por E-aranĝoj.

Laŭ la ekzemplo de plovdivanoj, ĉe niaj samurbanoj ekĝermis la ideo havi propran

E-organon. La iniciatema Ĥr. Ĥaralambev realigis tion. Li redaktis la monatan gazeton „Lumo“, lia bona kunlaboranto Ivan Nenkov tajpis ĝin kaj nokte, kiel deĵoranta oficisto, hektografis ĝin. En aŭgusto 1906 aperis la unua numero. Ekde la numero sesa la gazeto komencis aperadi, presita. Oni eldonis po 100 ekzempleroj, kiujn Ĥaralambev dissendadis. La redakcio de la gazeto ricevis salutleteron de la kreinto de Esperanto. „Lumo“ aperis regule kaj ĝiaj materialoj estis variaj kaj interesaj.

Se ni faros liston de ĉiuj bulgaraj E-gazetoj kaj revuoj, ni vidus, ke „Lumo“ aperis post „Mondlingvisto“ (1889), „La Espero“ (1890—1891), „Rondiranto“ (1902—1904), „Trumpestisto“ (1904), „Unua paŝo (1905—1906), „Bulgara Esperantisto“ (1906). Tiuj eldonaĵoj celis plej parte la propagandon de la Internacia Lingvo.

„Lumo“ signas novan etapon en la E-Movado de nia lando. En la ĉefartikolo de la unua numero ni legas: „Per tiu eldonaĵo ni, la tårnovaj esperantistoj, inter kiuj la esperanta fajrero plej frue donis vivajn rezultojn, havas celon kunigi la esperantistojn por pli fruktdona laboro.“

Post la malsukceso de l'sofia E-societo fondi en 1906 asocion, „Lumo“ sendis cirkuleron al ĉiuj bulgaraj grupoj, petante ilin diri sian opinion pri kunvoko de kongreso en Veliko Tårnovo. „Unueco estas forto“ — skribis la tårnovanaj esperantistoj.

Per alia cirkulero „Lumo“ sciigis, ke preskaŭ ĉiuj bulgaraj societoj akceptis la ideon pri kongreso. La samideanoj el Ŝumen proponis monhelpon. La elstara esperantisto Jonko Davidov elkore salutis tårnovanojn — „la unuajn pionirojn de la ideo en Bulgario“.

La longe atendita tago venis. La 5-an de aŭgusto 1907 vespere en hotelo „Royal“ okazis la unua intima renkontiĝo.

La sekvantan tagon en la plej granda lernejo „Ekzarĥo Josif“ (nun „N. Vapcarov“) okazis la solena inaŭguro. Ĉeestis 26 delegitoj kaj multe da gastoj. Ĥristo Ĥaralambev faris riĉenhavan paroladon. Li alvokis al unuigo de ĉiuj bulgaraj esperantistoj.

La 7-an de aŭgusto la kongreso daŭrigis sian laboron. Post varma diskutado oni decidis, ke la E-kongreso en Tårnovo estas la unua kongreso de la bulgaraj esperantistoj. Ĝi fondis nian nacian E-organizaĵon — Bulgara Esperantista Ligo — kun sidejo en Tårnovo. Ĥr. Ĥaralambev, prezidanto de „Lumo“, estis elektita prezidanto de la Ligo kaj ĉefredaktoro de „Lumo“, kiu fariĝis ĝia oficiala organo.

La kongreso elektis d-ron Zamenhof honora prezidanto de la Ligo kaj sendis al li specialan telegramon.

Per longaj artikoloj la bulgara gazetaro respegulis la laboron de la kongreso.

La E-veterano Nikola Zlatev donacis al la

Ligo 100 orajn frankojn. Li estis elektita honora membro de la Ligo.

Post la kongreso la junulara E-rondeto en Tårnovo komencis eldoni senpagan gazeton „Junulo“, kiu donis sciigojn pri la agado de la gejunuloj en Bulgario. La rondeto starigis al si la celon organizi junularan kongreson. La gimnaziano Panajot Ĥitrov estis unu el la iniciatintoj de ĉiuj junularaj aranĝoj.

En 1908 la sidejo de la Ligo translokiĝis en Ŝumen.

La militoj ĉesigis la E-agadon. La Balkana Milito forprenis la vivon de nia entuziasmo-plena samideano Ĥr. Ĥaralambev. Li pereis apud Bunar Hisar (1912). D-ro P. Ĥitrov karakterizas lin kiel „apostolon de Esperanto en antaŭmilita Bulgario“.

La Movadon restarigis nia fidela samideano Ivan Nenkov, kiu interesigis la junularon pri la Internacia Lingvo. Ilija Zlatev, Ĥaralambi Bårĉvarov, An. Pomakov, G. Kamakov, P. Popova, St. Daniskov, G. Donĉev daŭrigis la tradicion de la Societo. En 1923 Ĥaralambi Bårĉvarov eldonis sian Esperanto-bulgaran vortaron. Li tradukis kelkajn bulgarajn belartajn verkojn.

En 1923 la urbo gaste renkontis la delegitojn de la X Jubilea Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj. Vizitis ĝin ankaŭ grupo de rumanoj, inter kiuj Andreo Ĉe. Dum la kongreso oni starigis la demandon pri fondo de junulara E-ligo. La kongreso decidis, ke ĉiu loka E-societo havu grupon de lernantoj, kiu zorgu pri la propagando de Esperanto en sia medio. La esperantistoj-komunistoj okazigis fakan kunvenon.

De 1923 ĝis 1928 la E-Movado prosperis. La lernantaj grupoj „Flamo“ kaj „Zamenhof“ bone propagandis Esperanton inter la junularo.

E-Societo „Lumo“ helpis la esperantistojn en nia regiono. En 1926 en Tårnovo okazis distrikta konferenco kun reprezentantoj de 8 urboj kaj vilaĝoj. Oni elektis komitaton por propagando de Esperanto en la distrikto. En 1932 la organiza E-vivo tre aktiviĝis.

En 1936 Tårnovo dommastris la XXIII-an Kongreson de la Bulgaraj Esperantistoj.

Esperanton lernis multaj kontraŭfaŝistoj. La lingvo penetris eĉ en la distriktan malliberejon (nun muzeo). En ĝia ekspozicio oni povas vidi ankaŭ E-eksponaĵojn.

Post la 9-a de septembro 1944 la E-Movado en Tårnovo atingis denove aŭtoritaton. Ĝi kunlaboras kun la Patrolanda Fronto kaj aliaj amasaj organizaĵoj. En 1960 jam kvaran fojon en Tårnovo okazis E-kongreso de la bulgaraj esperantistoj — la XXXIV.

Nun la esperantistaro de Tårnovo akceptos la partoprenantojn en la X Festivfalo de la esperantista junularo en nia lando.

Olga Cankova



La busto de Lenin

En 1937 en Parizo estis malfermita universala ekspozicio.

El ĉiuj randoj de la mondo oni transportis ĉi tien specimenojn de plej interesaj aĵoj. Por ili oni konstruis specialajn pavilonojn.

Unu el la plej grandaj kaj belaj pavilonoj estis la sovetaj. Super ĝi alte leviĝadis la figuroj de laboristo kaj kolĥozanino, tenantaj serpon kaj martelon. Apud la pavilono estis kinejo, en kiu oni senĉese projekciadis sovetajn filmojn.

En la centro de la pavilono, meze de vivantaj floroj, staris bronza busto de Vladimir Iliĉ Lenin. Dum la daŭro de la ekspozicio tra la pavilono pasis multaj homoj: inter la vizitantoj estis urbanoj kaj kamparanoj, laboristoj kaj sciencistoj, maljunuloj kaj infanoj.

Iun fojon vespere venis blindulo. Lin kun delikateco de patrino kondukis je mano virino kun ĉagrena vizaĝo. Ŝi alkondukis la blindulon al la busto de Lenin.

La blindulo tuŝis per mano la bronzan buston. Lia manplato palpis la ŝultrojn de Lenin kaj glitis pluen.

Oficisto de la pavilono alproksimiĝis al la virino kaj demandis ŝin:

— Kiu estas tiu? Kion li deziras?

La virino respondis:

— Li estas mia edzo. Li perdis vidkapablon dum la milito. Li revis vidi Lenin. Sed ja li eĉ unu fojon ne vidis lin sur portreto.

La blindulo daŭrigis stari antaŭ la busto kaj atente movadis manon laŭ la vizaĝo de Lenin. El liaj okuloj fluis larmoj.

Poste li mallevis la brakon kaj diris kun tremanta voĉo:

— Nun mi vidis lin. Mi vidis Lenin.

El la rusa: Tempesto

La plej junaj studentoj

La 12-jara Saŝko Dvorak, sukcese plenuminte la lastan ekzamenon ĉe mekanik-matematika fakultato de Kieva Ŝtata Universitato „Taras Ŝevĉenko“, fariĝis la plej juna studento en Ukrainio. Li sukcesis gajni la konkurson inter abiturientoj, kiuj finis lernejon kun arĝenta aŭ ora medaloj (nur ili estis tiom, kiom estis la vakantaj lokoj).

La dekano de la fakultato, interparolinte kun Saŝko antaŭtage de l'ekzamenoj, rimarkis la inklinon de la knabo al precizaj sciencoj, lian neordinaran memoron. Tion atestis la karakterizoj de antaŭaj instruistoj de Saŝko. Li

lernis en Makijivka, Donecka provinco, dum ĉiu jaro trastudadis po du klasoj de la lernejo kaj finis ĝin kun arĝenta medalo. En la familio de l'instruistino de angla lingvo Zinaida Dvorak estas ankoraŭ du infanoj. La 9-jara Tanja transiris en 6-an klason (kvankam ŝi komencis viziti la lernejon, kiam ŝi estis 7-jara), la 4-jara Peĉjo libere legas abocolibron.

Ĉe la sama mekanik-matematika fakultato sukcese ekzameniĝis kievano Marina Burik, kiu havas 14 jarojn. Espereble tiuj du junaj gestudentoj povos ripeti la siaspecan „rekordon“, starigitan de la fama sciencisto, akademiano Nikolaj Bogoljubov, nuna direktoro de la Unuiginta Instituto de Nukleaj Esploroj en Dubna. Li ankaŭ studis en Kieva Universitato kaj estis tiam la plej juna studento. Diplomon pri finiĝo de la Universitato Bogoljubov ricevis, estinte deksesjara.

El „Tra Soveta Ukrainio“ № 4/1969

Solve de la logogrifo el 10/1969

1. Rosi. 2. Osto. 3. Stim. 4. Ioma.

Esperantisto-„rosmaro“-*(k-do Kiril Kalcev el Loveĉ)* salutas vin tutkore!



VINTRO

ЗИМА

Aminda, rava vintro!

Arboj kaj kampoj estas kovritaj de brile blanka neĝkovrilo.

Ĉio ŝajnas esti senviva, enigma, sed tio nur ŝajnas. Ni iru arbaren kaj rigardu pli atente la neĝornamon, kaj antaŭ niaj okuloj aperos mirinda vintra fabelo.

Jen — etajn piedsignojn en la neĝo postlasis perdriko, serĉanta forgesitan grenon aŭ semon. Post kelkaj paŝoj videbliĝas zigzagaj spuroj de longorela leporeto.

Subite sur vian kapon falas neĝfloko. Verŝajne tra l' arbopintoj preterkuris sciureto por kontroli sian kolekton de aveloj kaj glanoj, konservitaj en arbotruo. Aŭ eble neĝfloko falis pro tio, ke arban trunkon beke esploris pego, kontrolante, ĉu sub la dika ŝelo ne kaŝas sin vermo.

El arbara densejo montriĝas spuroj, similaj al tiuj de hundo, sed pli grandaj. Lupo iris serĉi sian viktimon. Ankaŭ en tiu blanka mondo kunvivas bono kaj malbono. Sub fantazie neĝornamitaj arboj, brilantaj en vintra suno, daŭras la vivo laŭ siaj neskribitaj leĝoj.

Ni prenu la skiojn kaj eniru tiun allogan mondon!

Saulceite Neilande, Riga

Думи е neĝkovrilo, arbopintoj и др. са съставени от два корена. Те се наричат купметитай думој — съставни думи.

Извадите всички съставни думи от горния текст. (А нете защ. в някои случаи имаме съединена гласна (запазено) звучанието на първа съставка) а в други не.

Думите които се състоят само от корен и наставка се наричат еднони. (aminda, videbliĝas и др.) При тях не е нужно да се пише представка. (сenviva, preterkuris и др.).

Извадите всички еднони думи от текста, по-

Любима, пленителна зима!

Дървета и поля са покрити от блестящо бяла снежна покривка.

Всичко изглежда да е безжизнено, загадъчно, но това само изглежда. Да отидем в гората и да разгледаме по-внимателно снежната украса и пред очите ни ще се яви чудна зимна приказка.

Ето — ситни следи в снега е оставила яребица, търсеща забравено зърно или семка. След няколко крачки може да се видят криволичещите следи на дългоухо зайче.

Ненадейно върху главата ви пада снежно пухче. Навярно по върхарите на дърветата е пребягала катеричка, за да провери своята сбирка (запас) от лешници и желъди, запазени в (някоя) хралупа. Или може би снежното пухче е паднало поради това, че стъблото на дърво е изследвал с клюна си кълвач, проверявайки дали под дебелината кора не се крие червей.

Из горския гъсталак се показват следи, подобни на тези на куче, но по-големи. Вълк е тръгнал да търси жертва. И в този бял свят съжителствуват добро и зло. Под фантастично украсените дървета, блестящи на зимното слънце, животът продължава по своите неписани закони.

Да вземем ските и да навлезем в този примамлив свят!

сочете техните съставни елементи и обяснете какво означават те.

Kovo

Preparu vin por inda prezentiĝo en la X Festivalo de BEJ en Veliko Târnovo!





ESPERANTO

en radio

Ĉiutage :

06,30—07,00 — Warszawa (Pollando), 25 m, 31 m, 41 m, 200 m (1502 kc/s);
16,30—17,00 — Warszawa, 31 m, 41 m;
Ĉiuj ondoj laŭ MET (Mezeŭropa tempo)

Dimanĉe :

06,30—07,00 — Warszawa: „Pola Esperanto-Movado“; „La semajno en Pollando“ (ripeto);
11,50—12,00 — Natal (Brazilo), 236 m;
16,30—17,00 — Warszawa: „Panoramo de la internaciaj eventoj“; „Esperanto Ekspreso“;
21,00—21,20 — Roma (Italio), 25,42 m, 30,90 m, 41,24 m. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉita al „Kuriero de Esperanto“.
21,05—21,30 — Sofia (Bulgario), 50,68 m;

Lunde :

00,30—00,55 — Sofio, 31,38 m, 49,42 m (ripeto);
00,45—01,00 — Rio de Janeiro (Brazilo), 441 m (680 kHz), 92,30 m, 60,30 m;
06,30—07,00 — Warszawa: Pollandaj temoj; „Trarigardo de Esperanto-revuoj“; „Esperanto Ekspreso“ (ripeto);
13,20—13,28 — Bern (Svislando), 31,46 m; 48,66 m; parolas d-ro A. Bauer;
16,30—17,00 — Warszawa: Komentario aŭ Noto de la tago; „Koncerto kun bondeziroj“;
23,45—24,00 — Valencia (Hispanio), 278 m;

Marde :

06,30—07,00 — Warszawa: Komentario; „Scienca Tribuno“ (1 kaj 3 mardon); pollandaj temoj;
16,30—17,00 — Warszawa: „Kune“ — junulara magazino; „Radia film-magazino“; „Aŭskultantoj petas — ni disaŭdigas“;

Merkrede :

06,30—07,00 — Warszawa: komentario kaj popularsciencia aŭ kultura ero;
13,20—13,28 — Bern: parolas Claude Gaccond: ondoj kiel lunde;
15,45—16,00 — Wien (Aŭstrio), 203,4 m, (1475) kHz; **nur ĉiun duan merkredon**;
16,30—17,00 — Warszawa: „Pri kio oni parolas en Pollando?“; Anguleto de nevidantaj esperantistoj (la unuan merkredon); „Por la progresantaj esperantistoj“; „Virina rubriko“;

Ĵaŭde :

00,05—00,30 — Bilbao (Hispanio), 212 m;
06,30—07,00 — Warszawa: Komentario aŭ pollandaj temoj;
16,30—17,00 — Warszawa: Komentario; „Leterkesto“;
22,50—22,58 — Bern, 48,66 m, 75,28 m; ripeto de la lunda elsendo;

Vendrede :

00,05—00,30 — Zagreb (Jugoslavio), 264,7 m (1133 kHz);
06,30—07,00 — Warszawa: Komentario aŭ priesperanta felietono; „Leterkesto“ (ripeto);
16,30—17,00 — Warszawa: Literatura aŭ kultura programoj;

Sabate :

06,30—07,00 — Warszawa: Komentario aŭ Noto de la tago; Literatura aŭ kultura programoj (ripeto);
16,30—17,00 — Warszawa: „La semajno en Pollando“;
19,30—20,00 — Rio de Janeiro, 375 m (800 kHz), 25,10 m;
22,50—22,58 — Bern: ripeto de la merkreda elsendo; ondoj kiel ĵaŭde;
23,00—23,40 — Rio de Janeiro, 214 m;
Noto: Warszawa elsendas ĉiutage ankaŭ sciigojn el la mondo kaj el la lando (escepte de dimanĉo).

Ĉe la Esperanto-Redakcio de la Pola Radio estas senpage havebla la teksto de la elsendaĵo pri la prezidanto de la Pola Akademio de la Sciencoj, prof. d-ro Janusz Groszkowski, kiu mem estas esperantisto, kiel ankaŭ aliaj tekstoj.

*Teksto kaj klišo el
„Heroldo de Esperanto“,
Nº 17/1969*

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta Komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Dimitr JĎRAKOV, Venelin MITEV, Dimitr MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

En ĵ. „**Naroden Drugar**“ — Jambol (9. X. 1969): informo pri malfermo de la lernoĵaro kun raporto de K. Zlatarov „Apero kaj evoluo de la Internacia Lingvo Esperanto.“

En la sama ĵurnalo (1. XI. 1969): informo de K. Kavargikov „Docento Georgi Dimov inter la geesperantistoj de Jambol“.

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ — Vraca (16. X. 1969): informo „Gasto al la esperantistoj“ (pri la gastado de la japana esperantistino Kimie Ozava).

En ĵ. „**Pirinsko Delo**“ — Blagoevgrad (18. X. 1969): artikolo de Georgi Markov „Esperanto — ingvo de la popoloj“.

En ĵ. „**Iskra**“ — Kazanlâk (25. X. 1969) — informo de N. Georgiev „La esperantistoj aktivas“ (pri malfermo de E-kursoj en Kazanlâk).

En ĵ. „**Borba**“ — Veliko Târnovo (23. X. 1969): artikolo de D. Doĉev, dediĉita al la X Festivalo de BEJ.

En la sama ĵurnalo (15. XI. 1969): artikolo de Bojan Conev „Konatigi la mondon kun Bulgario — mia ŝatata okupo“, dediĉita al la X Festivalo de BEJ.

En la sama ĵurnalo (11. XII. 1969) en la rubriko „Antaŭ la Festivalo „Esperanto 1970“: artikolo de Olga Cankova, dediĉita al la merita aganto Ĥaralambi Baĉvarov kaj lia multflanka E-agado.

En ĵ. „**Haskovska Tribuna**“ (28. X. 1969): informo de Marija Nikolova „En Svilengrad — tri kursoj de Esperanto“.

En la sama ĵurnalo (27. XI. 1969): informo el Ĵeko Zaprianov „Distrikta renkontiĝo de esperantistoj“, kiu okazis en Dimitrovgrad je ea 15—16. XI. 1969.

En la sama ĵurnalo (18. XII. 1969): informo de Ĵeko Zaprianov „Celebrado de d-ro L. L. Zamenhof en Dimitrovgrad“.

En ĵ. „**Oteĉestven Front**“ — Sofio (11. XI. 1969): informo de A. Tanev „Per Esperanto — tra la mondo“ (pri E-kursoj en Karlovo kaj internacia E-simpozio, dediĉita al Ivan Vazov, Ĥristo Botev kaj Vasil Levski en la komenco de majo 1970 en Karlovo).

En la sama ĵurnalo (12. XI. 1969) en artikolo „Ne rustiĝinta batalilo“ de Sl. Davidov oni mencias, ke docento Belĉo Nikolov, propagandisto en Varna, posedas ankaŭ Esperanton.

En la sama ĵurnalo (26. XI. 1969) en artikolo „Flama kaj abnegacia batalantino“ de Mitra Naĉeva oni mencias, ke Vela Piskova posedis Esperanton.

En la sama ĵurnalo (4. XII. 1969) en artikolo „La mondo pri Vapcarov“ de Nik. Dobrev oni mencias, ke la versaĵoj de Vapcarov aperis ankaŭ en Esperanto.

En ĵ. „**Pogled**“ — Sofio (17. XI. 1969) la konataj aŭtoroj fratoj Mormarevi publikigas felietonon „Esperanto“.

En ĵ. „**Na Preden Post**“ — Godeĉ (20. XI. 1969): artikolo de Marija Stefanova „Placo kun la nomo Esperanto“.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ — Sofio (29. XI. 1969): aparta informo, ke k-do N. Aleksiev, prezidanto de BEA, estas honorita per ordeno „Georgi Dimitrov“ — la plej alta en nia Respubliko, okaze de lia 60-jariĝo.

En la sama ĵurnalo (16. XII. 1969) en la informo „Meritaj distingoĵoj“: sciigo, ke la Prezidentaro de la Bulgara Parlamento pro longjara popolutila kaj kleriga agado distingis per ordeno „Kiril kaj Metodij“ unua grado la gazeton „Bulgara Esperantisto“ kaj per la sama ordeno, dua grado — ĝian ĉefredaktoron Kunĉo Vâlev.

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ — Vraca (29. XI. 1969): informo „Manifestiĝoj de la junaj esperantistoj dum la tagoj, dediĉitaj al Lenin“ (pri la agaro de E-Societo „Verda Raketo“ en Vraca).

En ĵ. „**Rodopski Ustrem**“ — Smoljan (4. XII. 1969): informo de Marija Diĉeva en la rubriko „Kulturaj sciigoĵoj“ — pri la seminario por instruistoj de Esperanto en la distrikto de Smoljan, kiu okazis la 30-an de novembro 1969. En la sama ĵurnalo (13. XII. 1969): artikolo de Marija Petrova „La kvara plenkusido de la Distrikta Komitato de BEA en Smoljan“, okazinta la 29-an de novembro 1969.

En revuo „**Plamâk**“ (№ 21/1969) en artikolo de Angel Todorov „Verkisto kaj kritikisto-komunisto“ (Ivan Ruĵ 60-jara) oni skribas, ke Ivan Ruĵ verkis iam ankaŭ versaĵojn en Esperanto kun virina pseŭdonimo Agnesa Proletova.

En ĵ. „**Nov ĵivot**“ — Kârĝali (13. XII. 1969) en turka lingvo estas publikigitaj du materialoj: la unua — dediĉita al d-ro Zamenhof kun lia portreto, kaj la dua — de Tibor Sekelj — „Ĉe la turkoj de la grotoj en la nordorienta parto de Malgranda Azio“, tradukitaj de Nijazi Ĥjuseinov el „Heroldo de Esperanto“.

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — Loveĉ (16. XII. 1969): artikolo de Ilija Ivanov „Granda homamanto kaj pacbatalanto“ (okaze de 110 jaroj de la naskiĝo de d-ro Zamenhof).

En revuo „Esperanto“ — oficiala organo de UEA 12/1969, aperis kiel fronta la artikolo de nia aktiva samideano Nikola Nikolov el Sofio „Ok rimedoj por certa progreso“. La Redakcio de „Esperanto“ notas, ke Bulgara E-Asocio estas „sendube unu el la plej sukcese kaj konscie laborantaj landaj asocioj de UEA“.